

Antaŭparolo

Gekaraj,

NEspA, kun granda tumulto ekde ĝia ekzisto pasigis 25 jarojn kaj ni celebras nun la arĝentan jubileon kun diversaj programeroj. Ĉi jara programo komencas per tiu ĉi historia 11-a Himalaja Renkontiĝo. Kun granda plezuro, *NEspA* bonvenigas vin por partopreni ĝin. Krom tio, sendube, ni propagandos kaj instruos dum la tuta jaro nian lingvon, okaze de la Jubilea Jaro.

Karaj, dum tiuj 25 jaroj, *NEspA* provis fari multon kaj nun alvenis vere la momento analizi la rezultojn, rigardante malantaŭen. Ĝis nun, ni rigardis nur antaŭen. Ni propagandis, instruis kaj fondis diversajn klubojn en multaj lokoj de Nepalo; sed, bedaŭrinde, nur kelkaj estas nun bone funkciantaj. Esperanto estas alloga studobjekto en tre malriĉaj landoj, kiel Nepalo, ĉar ĝia origino estas en Eŭropo kaj oni tuj ekpensas ke se oni sukcesas lerni ĝin, oni povas senprobleme vojaĝi aŭ ricevi helpon. Sed, je la fino, oni spertas ke tio ne ĉiam okazas. La homoj tuj malaliĝas, distanciĝas de la Asocio kaj de la Esperanto-movado. Eĉ kelkaj bonaj regantoj de la lingvo pensis tiele kaj ili misuzis ĝin kiel propogandilo de falsaj raportoj de siaj etnajgrupoj. Aliflanke, kelkaj fondis vojaĝagentejon kaj tute malebligas al alvenintaj turistoj veni al la asocio, blokante ilian emon. La asocio ne estas taŭga loko por ke ili povu aranĝi tie iliajn aferojn. Tamen *NEspA* - kiel respondeca organizo - silente, tolereme restadis kaj restados.

Grandega obstaklo en nia Movado, longe de la tuta periodo, estis la malapero de la gejunuloj. Ili unue eklernis la lingvon, sed, pro ekonomiaj kialoj, ili almigris al riĉaj landoj. La Unua Himalaja Renkontiĝo okazis la 26-a de februaro 1990 (sub la gvidado de Philip Pierce, LP Agnihotry, D-ro Mukunda Raj Pathik, Marko Ono kaj Bharat Kumar Ghimire).

Sendube, ĉiuj ĉeestantoj de tiu unua renkontiĝo estas kunfondintoj. Nun ni okazigas la 11-an. Tiuj eventoj kontribuis al la evoluo de la nepala movado. Ankaŭ la Himalaja Renkontiĝo alfrontis multajn obstaklojn ek de ĝia ekezkisto. Kelkaj samideanoj, kies motive kaj celo estas komercado, provis okazigi paralelajn programerojn (kaj ili daŭre faras tion). Eble ili akumulis profiton, sekve de la programo, sed ni ĉiam celis nur plibonigon kaj ampleksigon de niaj internaciaj rilatoj. Ni celis antaŭen iri, ni volis atingi proponitan celon do, sekve ni troviĝas en la nuna situacio. Kaj nun, ni lasas en viaj manoj la prijuĝon, por analizi nian laboron, kaj pritaksi ĝin ĉu pozitiva, ĉu negativa. Dum tiu longa periodo, multaj el ni, nepalaj esperantistoj, provis vojaĝi eksterlanden, okaze de diversaj esperantaj eventoj kaj provis kolekti spertojn. Ni ankaŭ sukcese okazigis la 4-an Azian Kongreson kaj la Unuan Sud-Azian Seminarion. Ambaŭ programoj grave rolis por nia loka movado.

Nun NEspA planas pli konkrete festi ĝian jubileon. Ni planas propagandi kaj instrui, laŭeble en pluraj diversaj lokoj. Alia grava afero: kiel dum tiuj 25 jaroj, ni ĉiuj devos kune labori por la komuna celo. NEspA pretas neŭtrale agi kaj kunlabori kun ĉiuj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj kiel antaŭe. Sed, bonvolu ne forgesi ke la ĉaro de NEspA daŭre iras antaŭen kaj bonvolu tiuj, kiuj, volas puŝi ĝin antaŭen, ne heziti veni. Sed tiuj kiuj volas malpuŝi ĝin, malebligi la bonan iradon, pereos en la kurso de la tempo, sed la ĉaro daŭre iros rekte, kuraĝe, kaj ne flankizante al la vojon celitan. Sendube, ĉiuj fruktoj en la sama arbo ne egale bongustas aŭ same restas; simile okazas ke ni ne pensas egale, sammaniere koncerne esperantujon kaj ĝian evoluon.

Ni refoje dankas al ĉiuj mondaj organizoj (UEA, KAEM, ILEI kaj aliaj neesperantistaj organizoj) enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj

por ilia valora helpo por nia movado. Ni esperas la saman dum Venontaj tagoj. Ni refoje volas bonvenigi vin, amikoj partoprenantoj de la nuna Renkontiĝo. Ni esprimas specialan saluton kaj dankon al *Hori Jasuo* el Japanio, kiu ekde 1990 partoprenis ĉiujn Himalajan Renkontiĝon (krom du). Sen viaj kunlaboroj, ni ne atingus la hodiaŭan situacion.

~ *Nepala Esperanto-Asocio*

Jen Mi Sendas Mian Gartulmesaĝon Por La Renkontiĝo

Esperante sukceson de la IHR, mi petas de vi, ke bv, transdoni mian saluton al partoprenantoj.

Karaj geamikoj,

Okaze de la 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo, mi sendas mian gratulmesaĝon kiel estrarano de UEA pri Azia movado.

IHR estas tre unika renkontiĝo en Esperantujo pro ĝia riĉa enhavo kun naturaj kaj diversaj programeroj. Pli kaj pli IHR fariĝis unu el la allogaj eventoj, kiuj okazas ĉirkaŭ ni.

Por esti vera internacia lingvo, Esperanto devas esti uzata en ĉiuj kampoj kiel komunikilo de interkomunikado kaj utila ilo por gajni novan scion. Espereble tiu ĉi renkontiĝo fariĝos unu el tiaj interkomunikadoj.

Kvankam mi ne povas esti inter vi, sed mia animo ĉiam sekvos vian vicon.

Esperante sukcesan renkontiĝon, mi kore salutas

~ *LEE Jungkee*
Estrarano de UEA

Vivu Esperanton Longe Kaj Sukcese

Kun granda plezuro NEspA decidis aperigi montejon denove kadre de la 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo. Mi kiel prezidanto de NEspA elkore bonvenigas la esperantistojn de diversaj landoj kiuj partoprenas ĝin. Speciale dum la renkontiĝo, ni vojaĝos diversajn lokojn kun celo praktiki esperanton, ĝui belajn lokojn ktp. Kompreneble, krom beleco Nepalo havas riĉan kulturon kaj ankaŭ ĝi nomiĝas lando de temploj, lando de Budho kaj lando de plej altaj montoj. Pro tio unu foja vizito al Nepalo ne sufiĉas. Himalaja renkontiĝo donas al esterlandaj samideanoj ŝancon koni nepalan kulturon, popolon kaj ĝui la naturon. Ni havas ĉion, kion vi bezonas. Do, mi petas al ĉiuj samideanoj ke bv profiti, ĝui nepalon kaj subteni esperanto-movadon de nepalo.

Ni spertas nun ĉe ni ke multaj homoj interesiĝas pri Esperanto. En mia oficejo, mi sukcesis propogandi esperanton kaj kelkaj jam eklerenis ĝin kaj nun eĉ kelkaj estas membro de nia asocio. Mi foje skribas artikon pri Esperanto en nepala lingvo kaj ĝi aperas en la revuo de mia oficejo. Miaj artikoloj ankaŭ helpas propogandi esperanton nacie ĉar mi laboras en nacia banko. Mia koro estas ĉiam malfermita por Esperanto kaj esperantistoj.

Homfaritiloj ekzemple komputilo, reto, aviadilo mallongigas la monddistancon tamen, la barilo inter ni estas lingvo. Ĉar ligojn ni devas koni por komuniki unu la alian kaj laŭ mia opinio plej taŭga lingvo por komuniki estas Esperanto. Ĝia facileco, logikeco estas taŭga por lerni. Do ni ĉiuj kune lernu, propogandu, kaj konu la mondon per Esperanto.

~ *Indu devi Thapaliya*
Prezidanto de NEspA

La Vojaĝanto

La vojaĝanto ekvojaĝis
Kaj ekesploris ion
pro tio kelkfoje li iris al ĝardeno
provis paroli kun floroj, dume aperis kelkaj birdoj
ili ekkantis tre belajn kantojn
aŭskultante kantojn de birdoj
li komprenis ĉion
ĝuante li ekploris
oh !Dio !“Mi dankas vin”
“vi donis min tiom ĝojo kiel maniere
mi povas repagi vin?”
li imagante parolis mem
tio estis donaco de naturo.

La vojaĝanto ŝanĝis sian vojon, senlace li vojaĝis
ne nur al unu lando; ne nur al unu kontinento
vojaĝis tra la mondo
kvankam, li trovis nenion.
Li perdis lian emon
li perdis tutan monon
kaj perdis ĉion
ankaŭ lia vojaĝo laciĝis
la ĉielo rigardis lin
mankis suno kaj luno, perdiĝis steloj
la vivo estis ne videblaj
nur unu rivero iris kun malgranda kaj ĝentila voĉo
restis nenion
finfine li revenis hejmen
estas stranga
li trovis feliĉon
en lia varma koro.

*~ D-ro Mukunda Raj Pathik
KAEM-ano*

Kiu Estas Gorĥo?

La nomo 'gorĥo' devenas el monteta vilaĝo, Gorĥa. El tiu vilaĝo la regno, Neplujo estis pligrandigita.

Gorĥo estis parto de brita armeo dum preskaŭ 200 jaroj, sed kiuj estas tiuj timigaj batalantoj?



“Estas pli bone morti ol esti kovarda” estas moto de mondfama gorĥa soldato kiu estas integra parto de brita armeo. Ili ankaŭ portas en batalo ilian tradician armilon 18 collongan kurvan tranĉilon konata kiel KHUKURIO (mallonga kurva kaj larĝa sabro uzata en Nepalo kiel armilo). En pasinta tempo estas dirite ke kiam la khukurio tiriĝas el khukuriingo en batalo ĝi devis gustumi sangon. Se ne lia mastro devas tranĉi sin mem por gustumigi sangon al kukhurio antaŭ reveni ĝin al ingo. La viktoria (ano de brita reĝino viktoria 1819-1901) identigis ilin kiel mirakla raso ekscianta en ili apartajn virajn kvalitojn.



La gorĥoj lojale batalis tra la tuta mondo por fortigi potencon de britujo ricevante 13 viktoriajn krucojn, pli ol 20.0000 gorĥoj batalis en la dua mondmilito kaj 43000 gorĥoj perdis vivon. En pasintaj 50 jaroj ili servis en Hongkongo, Malajzio, Kipro, Kosovo kaj nuntempe en Irako kaj Afganio.

Plej parte en gorĥa soldato rangoj estis ĉiam regitaj de 4 etnaj grupoj Grungo kaj magaro el centra Nepalo, Raio kaj Limbuo el orienta Nepalo. Ili vivas en monteta vilaĝo. Ili gardas ilian kutimojn kaj kredojn kaj la brigedo sekvas ĉefan festivalon de Neplalo (Deshain) en ĝi ili ofertas kaprojn kaj bubalojn al Dio.

La soldatoj ankoraŭ estas elektataj inter junuloj kiuj loĝas en montetoj de Nepalo. Pli malpli 28000 junuloj konkuras en selektado por esti Gorĥa armeo de britujo kaj fine britujo prenas plej fortajn kaj kapablajn 200 junulojn inter 28000 kandidatoj ĉiu jare. Selektado estas difinita kiel plej malfacila kaj plej feroce selektado el la tuta mondo. Kandidatoj devas kuri supren en monteto 40 minutojn portante 55 kg da roko en korbo sur sian dorson.

Princo de britujo (Harry) vivis kun Gorĥa bataliono dum lia 10 semajna restado en afganio. Historiisto Tony Gould diris Gorĥoj alportis bonegajn kombinaĵojn de kvalito en milito. Li plue diris "Gorĥoj estas talentaj, kuraĝaj, obemaj, agemaj kaj cedemaj al discipline".

Historie, Gorĥoj kiuj servis sian tempon en brita armeo maksimume 30 jarojn oŭ minimume 15 jarojn ricevas pension kaj devas reveni Nepalujon.

~ *Pradip Ghimire*

Estrarano de NEJO

Jara raporto de ILEI Nepalo, 2014

1. Nepala Esperanto Asocio organizis Specialan renkontiĝon 6a-17a de marto ĉirkaŭ 45 eksterlandaj kaj enlandaj esperantistoj partoprenis tutan programon. Nepala sekcio de ILEI organizis prelegojn en diversaj temoj dum tiu periodo. Okazis 16 prelegoj en diversaj temoj. Intertempe ni survoje al diversaj eskruslokoj propagandis nian lingvon.
2. S-orj Bharat Ghimire kaj Janardan Upreti partoprenis 2an Sud-azian Seminarion en Lahoro, Pakistano (20-24 Februaro). Bharat nome de ILEI prelegis en la tempo "Kial esperanto en Sud-aziaj landoj?" en Panzaba Universitato. Ĉeestantoj estis geprofesoroj kaj gestudentoj de la esplorado. Kaj poste ni faris prelegon en diversaj lernejoj.
3. Ni organizis diversajn prelegojn en nia asocio rilate al esperanto instruado ĝis Majo. En fino de Junio, ni organizis esperantan kurson en Esperanto-Domo en Thamel kaj ĝi kontribuis pli grandigi la nombron de Esperantistoj en nia loko.

4. En Junio kaj Aŭgusto, Prezidanto de NEspA Indu Devi Thapaliya kaj Bharat Ghimire partoprenis ILEI konferencon en Montevideo kaj 99an UK-n en Bona Aero. Ili disdonis informilojn survoje en Montevideo, Bona Aero kaj Rosario skribitan en Hispana lingvo kaj ni faris saman dum nia vojaĝo al Brazilo (ĉi foje ni disdonis foliojn skribitan en Portugala lingvo). Indu faris plej parte ĉiam sur la strato.
5. Bharat Ghimire vojaĝis orientan parton de Nepalo en Oktobro, ĉirkaŭ tri Semajnoj kaj instruis esperanton en Itahari, Surunga kaj Birtamod sed ne al novuloj, sed por tiuj, kiuj jam eklernis nian lingvon. Bharat instruis al eternaj komencantoj.
6. En pasinta Novembro, ILEI Sekcio de Nepalo organizis Specialan Unu Montana Kurson. Ĉeestis ĉirkaŭ 30, kaj en la fina program 18 restis. Ili ricevos atenston de la mano de S-ro Hori Yasuo kiu planas viziti nepalon por partopreni 11-an himalajan renkontiĝon venonta februaro- marto.
7. Bharat Ghimire faris prelegojn pri nia lingvo kaj instruis bazan esperanton en diversaj kolegioj laŭ la peto de la direktoroj. Fakte Bharat ne intencis fari tion sed ili mem petis fari tion. Bharat faris preleon en Pentagon International collage, Premier collage kaj Nepal college of Travel and Tourism (Mirejo faris prelegon tie kiam ŝi vizitis Nepalon)
8. Ni organizis prelegon de eksterlandaj gastoj en la tuta jaro. La grava prelego estis de Monike el Francio en pasinta oktobro.
9. S-ino Indu kaj Kaj Pradip Ghimire aperigis diversajn artikolojn en nepalaj gazetoj kaj en revuo Esperanto, Kontakto kaj pli multe interrete pri nia lingvo.

Resume: 2014 estis pli sukcesa jaro por nia movado ol 2013. Mi esperas ke 2015 ankaŭ iĝos sukcesa kaj ni faros pli multe ol en jaro 2014. Do, ni estas kontentaj. Mi elkore dankas al D-ro Mukunda Raj Pathik kaj LP Agnihotry por la daŭra subteno.

~ *Bharat Kumar Ghimire*

Konu la Unikan Flagon de Nepalo

La nacia flago de Nepalo estas nura nacia flago de la mondo kiu ne havas kvarangulan formon. La flago estas simpligita kombinaĵo de du ununuraj vimploj, kies purpura ruĝeco estas la koloro de la rododendro, la nacia floro de Nepalo kaj ruĝa estas la signo de venko en milito. La blua limo estas la koloro de paco. Ĝis 1962, la emblemoj de la flago, la suno kaj la duonluno, havis homajn vizaĝojn. Sed post la serioza diskutado inter modernaj intelektuloj la vizaĝoj estis forigitaj por modernigi la flagon. La vizaĝoj restis sur la suno kaj la luno sub la Reĝa Normo je la forigado de la monarkio en 2008.

La flago estis adoptita, kun la formado de nova konstitucia registaro, la 16-an de decembro 1962. La individuaj vimploj estis uzitaj antaŭ du jarcentoj kaj la duobla vimplo ekde la 19-a jarcento. La flago prenas la bazan dizajnon de la origina hindua dizajno, kiu estis en uzo dum pli ol 2,000 jaroj. Jen estas nacia flago de Nepalo.



Interpreto de Nepala Flago:

La blua limo simbolas la pacon kaj harmonion kiu estis ofta en la lando ekde la aĝo de Siddhartha Gautama (Budho), kiu naskiĝis en Nepalo. La ruĝa estas nacia koloro de Nepalo kaj ĝi indikas la bravan spiriton de nepalaj homoj. Meze en la flago

du, trianguloj simbolas himalajon kaj monton eĉ prezentas du grandajn religiojn, nome hinduismo kaj budhismo. Alivorte, la ruĝa triangula flago estis hindua simbolo de venko, de la tempo de Ramajano kaj Mahabharato. La bildo de ĉielaj familioj reprezentas restadon, esperante ke Nepalo daŭros tiel longe kiel la suno kaj la luno daŭros. La luno simbolas trankvilecon kaj malvarmetan veteron de himalajo, dume la suno simbolas la varmego kaj alta temperaturo en la suba parto (Ebenajo) de Nepalo. Alia interpreto, la formo de flago ankaŭ simbolas nepalstilan pagodon.

~ *Pradip Ghimire*

Nova Klerismo kaj Toleremo

Ondo de malraciaj ideoj disvastiĝas tra la mondo. Neniulando en la mondo ŝajnas sekura kontraŭ ili. Ili estas de religia naturo kaj de nereligia naturo. Multaj homoj ankoraŭ disvastigas ideojn el malnovaj tradicioj pri la ekesto de la mondo kaj de la homo, kiuj ne eltenas racian ekzamenadon fare de kvin-jarabebo. Multaj, tute aparte en ekonomie evoluintaj landoj, disvastigas ankaŭ ideojn baze de mezepokaj mitoj pri supernaturaj estaĵoj, kiuj nuntempe regas en multaj filmoj aŭ en aliajformoj de ‘artaj’produktaĵoj.

La apliko de tiuj malraciaj ideoj portas al krimoj kontraŭ la homaro malfacile akcepteblaj kaj de religiaj kaj de nereligiaj homoj kaj ĝenerale al pliigo de perforto en ĉiuj landoj de la mondo.

Unu el la plej malraciaj ideoj estas tiu de la ebleco de daŭra kresko de la ekonomio eĉ se la sekvo estas la malapero de la mondo mem pro ekologia katastrofo, kiu jam anonciĝas. Ni devas trovi novan ekonomian sistemon, kapablan kombini liberecon, justecon kaj fratecon.

Estas tempo kontraŭ batali la malracion per nova formo de racia klerismo. Ni ekiru de la tiamaj kleristoj de la 18-a jarcento kaj plu konstruu sur iliaj rezultoj. Ĉiupovas facile trovi en sia lingvo, kaj ankaŭ en Esperanto, verkojn de Volter (Voltaire) aŭ de aliaj kleristoj.

Kune kun klerismo iru 'toleremo' al aliaj kulturoj kaj pensmanieroj. Nur tiel oni povos kune antaŭeniri. Neniu insistu pri la absoluta vero de siaj pensoj, sed ĉiu kun kritiku siajn pensojn kaj tiujn de la aliaj.

~ *Renato Corsetti*

Paĝo de Opinioj

Kial lerni esperanton? por kiuj celoj vi uzas ĝin?

Por konunikiĝi internacie pli agrable ol angle. Por faciligi miajn vojaĝojn. Por esti plia ero de la parolantaro kaj tiel la uz-ebloj kreskus (Laborcele mi ŝatus) Por amikiĝi internacie kaj sub justeco. Por havi aliron al centoj da libroj ĉefverkoj originalaj kaj same tiuj plej gravaj el minoritataj lingvoj. Por fojefoje perlabori monon. Por lerni lingvon iom rapide. Por ĝui internacian amikecon/etoson neniam spertitan per aliaj lingvoj. Por havi etikan celon en mia vivo, ere pli bonigi la mondon por ke ĝi pli justiĝu kaj homoj enŝparu tempon, penon kaj monon por pli efika lingvo. Por kanti, krei videojn, renkontiĝoj. Por trovi pli ofte pli mens-malfermajn homojn kiuj ŝajnas pli saĝaj ol averaĝa homo. Por havi milfoje pli interesan fb konton ol neesperanta jam malofte ensalutita pro enuo.

~ *Alex Escomu*

Mi lernis esperanton ĉefe por scivoleco, poste kiam mi sciigis pri sian celon por partopreni ĝin kaj montri mian apogon. La tre bonaj aferoj kiuj okazis min poste, mi ne atendis sed mi ne ŝanĝos tiujn pro neniu.

~ *Reset Reboot*

Por la ideo. Mi ne necesas ĝin, sed mi sciu ĝin. Se ĉiuj Esperanton lernos, ĉiuj ĝin necesos.

~ *Jan Nowak*

I. a por komuniki kun vi!

~ *Ronald Sĉindler*

Laŭ mi ĝi havas gravan spiritualan sencon pro sia idealo.

~ *Kevian Morel-Fourrier*

Por paco de la mondo

~ *Hideko Miyazaki*

Mi lernis esperanton, ĉar laŭ mi ĝi estas dialektita uneco inter ĉefaj naciaj kaj internaciaj principoj en evoluo de monda kulturo. Tio ĉi estas tre proksime al miaj propraj pensoj pri universala kulturo je epoko de tutmondiĝo. Krome mi amas tiun lingvon pro ĝia logiko kaj beleco.

~ *Ander min*

Por paroli kun mia edzo

~ *Anna Lowenstein*

Mi ŝatas Esperanton ĉar dank al tiu ĉi lingvo mi povas legi tre interesajn librojn. Kaj krome, mi povas paroli kun homoj loĝantaj en diversaj landoj kies lingvojn mi ne scipovus.

~ *Rafael Despradel Harnandez*

Ĉar mi rajtas revi. Mi estas libera. Esperanto liberigas min.

~ *Eduardo Dolz*

Ĉar mi volis provi al mi mem ke mi kapablas lerni kaj uzi fremdan lingvon.

~ *Steve Wagenseller*

Por reformo, revolucio de mia ena mondo konektante kun la ekstera.

~ *Welism Di*

La Trako de la Reĝinoj !

« Ĉiam pli alten, ĉiam pli bele ! » sed la kvar sepdekulinoj kiuj flugis al Nepalo komence de oktobro 2014 havis alian celon : « vidi la montojn de for kaj la homojn de proksime ». Nia ĉiĉerono, Gelbu, venis al Francio en januaro por perfektigi sian konon de la franca lingvo, por renkonti vojaĝontojn kaj plani la restadon laŭ iliaj deziroj. Tiel ni decidis resti nur unu tagon en Katmanduo kaj tuj flugi al Pokhara por piedvagadi en la ĉirkaŭaĵon de tiu belega urbo, vidvide al la Anapurna Montaro. Per buseto ni supreniris al fora vilaĝeto-Bhumdi- elektro estis instalita tie nur en 2014, ĝi ne estis en nia ĉambro sed en la koridoro kaj nokte ni devis eliri por viziti necesejon instalita speciale por ni post nia alveno. Bonŝance kiam ni alvenis estis festo, la junuloj de la diversaj vilaĝoj ludis retpilkon. La vilaĝanoj multnombre venis por kuraĝigi ilin kaj forte aplaudis ! belege estis vestitaj la virinoj, ili surloke kuiris, vendis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, estis amikeca etoso en belega kampara ĉirkaŭaĵo. En niaj pakaĵoj ni kunportis vestaĵojn por infanoj, do ni informis respondeculon. Li proponis al deko da virinoj viziti nian loĝejon je la fino de la festo. Patrinoj venis, ofte kun bebo sur la brakoj kaj estis same kiel en bazaro. Ili elektis taŭgajn vestaĵojn por siaj infanoj kaj foriris tre feliĉaj.

Por bone vidi la montojn oni devas frue ellitiĝi, tiam la suno bone lumigas la pintojn kaj ni parkerigis la nomojn ... Anapurna I, II, III, Anapurna IV, Anapurna Sud, Machhapuĉre pli fronte, Manaslu pli for. Iam mi diris al Gelbu tiu monto memorigas al mi similan ĉe ni kaj mi komencis diri: « le Dôme... kaj tuj li aldonis... des Ecrins »! estis surprizo kaj ĝojo, ambaŭ el ni povis rakonti pri grimpadado de ĝi. Piedirante ni vidis multajn rizkampojn, trairis

multajn vilaĝetojn, salutis gelernantojn survoje al lernejo, vizitis la templon de la Paco konstruita de la Japanoj, trairis belegan arbaron, gustumis lokajn frandaĵojn. Sub varma suno ni malrapide paŝis, ni estis ekster la mondo, ekster la tagaj zorgoj... gravas nur antaŭen iri !

Kial la treko de la Reĝinoj ? ĉu nur aludo al la Reĝa treko ?
Imagu : Nia grupo havis kuiriston kiu bonege kuiris por ke ne manku al ni la fortoj por piedvagadi. Dum la tuta restado mi opinias, ke ni tre bone manĝis, tre sane, surloke estis aĉetita la nutraĵo. Krom la kuiristo estis 2 portistoj, junaj kaj fortaj kaj nia mirinda ĉiĉerono, ĉiam preta helpi al ni de frumatene ĝis vespere.

Mi mallongigis mian piedmigradon por reiri al Katmanduo kaj viziti Esperantistojn. Ĉe la flughaveno atendis min Esploristo (Pradip Ghimire) junulo kiu iĝis mia ĉiĉerono. Ni tuj vizitis la prezidantinon de la Nepala Esperanto-Asocio Indu Devi THAPALJA kaj mi havis la honoron tranokti en la « esperanto ĉambro » kie jam tranoktis famaj esperantistoj. Poste ni iris al la sidejo, tie mi aŭskultis prelegon pri politiko en Nepalo, tiom da diversaj partioj ... kaj daŭre estas problemoj por regi la landon. Estis multe da partoprenantoj kaj mi ĝojis konatiĝi kun ili – kaj revidi la konatulojn. La morgaŭan tagon mi prelegis pri nuntempaj virinoj kiuj famiĝis en Esperantujo je diversaj kampoj kaj kun kiuj mi persone konatiĝis: Marjorie Boulton, Katalin Farago, Szofia Korody, Kristin Tytgat, Claude Nourmont, Katalin Kovats, Anna Loweinstein, Franciska Toubale, Mirejo Grosjean, Spomenka Štimec, Barbara Pietrzak, Ilona Koutny, Renée Triolle. Tion, kion mi ne antaŭvidis ... estas ke partoprenis pli ol 30 viroj kaj nur 3 virinoj ! ĉu bone elektita temo ? Estis interesaj reagoj, unu partoprenanto demandis al mi kial mi elektis tiun temon !

Noktiĝis kaj iu esperantisto demandis al mi : « ĉu vi pretas motorcikli por reiri al la domo de Indu ? » Mi tute ne pensis pri la terura trafiko, mi rigardis la motorciklon, mi kapablas grimpi sur ĝin do mi simple jesis : je la komenco mi forte premis la dorson de la ŝoforo kaj iom post iom mi malstreĉiĝis sed longa estis la vojo, malvarmeta la vespero kaj multnombraj la veturiloj, la motorcikloj, la biciklantoj, la piedirantoj, malkomforta la vojo : kia aventuro !

Antaŭ ol vojaĝi al Nepalo mi rilatis kun M. S. SHANY, esperantisto kiu invitis min viziti 2 lernejojn kie li instruas esperanton. Per DVD mi montris mian regionon la Sudaj Alpoj kaj tuj gelernantoj rimarkis similecojn kun partoj de Nepalo. Ĉiam estas plezuro interŝanĝi kun junuloj kaj mi forte kuraĝigis ilin plulerni la internacian lingvon kaj kore invitis ilin viziti la 100-an UK. en Lillo 2014 !

Ankaŭ vin, kara leganto, mi invitas iri al Lillo kaj espereble vi konatiĝos kun la entuziasmaj nepalaj junuloj !

~ Monique Arnaud

Dank' al Esperanto mi Vizitis Nepalon 10 Fojojn

La unuan fojon mi vizitis Nepalon en 1998 kun mia studento. En tiu dua Himalaja Renkontiĝo la partoprenantoj vizitis la nacian parkon ĉituan kaj poste la urbon Pokhara, sed ne grimpis la monton Annapuruna. Mi volis doni pli grandan ĝojon al la studento, pro kio ni apartiĝis de la grupo kaj dungante gvidiston, ni grimpis la monton. La monto estis tre bela, kaj tiu sperto ekligis min al Nepalo. En la sekva 3-a IHR en 2000 mi akompanis 4 gestudentojn. Ni grimpis la sanktejon Mukuthinato en la montaro Annapurna. Tiu ĉi montgrimpado estis perfekta kun neĝaj montoj kaj la du sanktejoj de Hinduismo kaj Budhismo. Je la sunleviĝo kontraŭ la montaro ni eĉ larmis pro tro da emocio.

En 2011 okazis la terorista atako al Novjorko, kaj oni ne emis vojaĝi ekteren, do la nepalanoj timis, ke ne venos eksterlandaj partoprenantoj al Nepalo. Ekde la 4-a Himalaja Renkontiĝo mi ne estis simpla partoprenanto, sed duona respondeculo, kaj kun klara konscio mi klopodis varbi japanajn partoprenantojn. En 2005 kiel prezidanto de KAEM mi invitis la 4an Azian Kongreson en Nepalo. Ĝis tiu tempo mi fariĝis duone nepalano. Kaj tiamaniere mi partoprenis en 8 el la 10 IHR-oj kaj krome mi vizitis 2 fojojn okaze de la Azia Kongreso kaj la 1a Sudazia Seminario. Nepalo fariĝis mia duona patrolando. Dank' al Esperanto mi povas viziti Nepalon, kaj miaj vizitoj ŝanĝis mian vivon kaj ankaŭ tiun de la japanaj gestudentoj, kiuj partoprenis en la IHR.

Nun mi havas multajn karajn amikojn en Nepalo. Mi havas eĉ filinojn: Arĉana kaj forpasinta Apsana, kaj genepojn en Nepalo: Alinka, Abhishek kaj Abhilasha Pokhrel. Bedaŭrinde mi ne havas patron kaj avon en Nepalo, ĉar mi mem estas tro maljuna.

Nun Nepalo ludas gravan rolon en la Esperanto-movado en la suda Azio. Mi deziras pli da progreso en la nepala movado.

Mia kara Nepalo

*Mirinda intermiksiĝo de kulturoj,
Surpriza kaoso en la urbo Katumanduo.
Mezepoka etoso plenas tie.*

*Homoj, homoj en diversaj vestaĵoj kaj ornamaĵoj,
Homoj, homoj kun malsamaj haŭtokoloroj,
Homoj, homoj parolantaj malsamajn lingvojn,
tamen ili estas nepalanoj!*

*Mirinda sankteco de la montegoj,
Surpriza beleco de la arbaroj.
Pratempa etoso plenas tie.*

*Homoj devenantaj de Tibeto,
Homoj kredantaj Budhismon,
Homoj kulturantaj terasajn kampojn,
tamen ili estas nepalanoj!*

*Nepalanoj estas honestaj,
nepalanoj estas sinceraj,
nepalanoj estas amikaj,
Mi pli kaj pli amas nepalanojn,
Mi pli kaj pli amas Nepalon.*

*Karaj nepalanoj!
Akceptu nin kiel vian karan amikon,
kiel vian patron kaj vian avon.
Mia kara Nepalo!*

~ **HORI Jasuo**

Renkontiĝo kun Nepalo

La 4a Azia Kongreso de Esperanto havis lokon en Katmanduo, la ĉefurbo de Nepalo. Mi partoprenis ĝin kaj por mi ĝi estis la unuafoja kongreso de Esperanto. Tiam mi estis komencanto kaj mi konis neniun esperantiston krom mia gvidanto. Ĉe la internacia flughaveno de Katmanduo esperantistoj salutis unu la alian. Mi vidis tion kaj sentis, ke "Saluton" estas la magia vorto, ĉar tiu vorto malaperigis barilojn inter la homoj. Mi ĝuis la programon de la kongreso, ekzemple nepala kanto kaj danco, jogo, duontaga ekskurso k. t. p. Malgraŭ tio, ke mi ne povis paroli bone, mi havis agrablajn tagojn dum la kongreso. Ĉirkaŭ du jarojn post la kongreso mi aliĝis al la Internacia Himalaja Renkontiĝo. Mi delonge sopiris al piedvojaĝo en montaro en Nepalo. Dum la piedvojaĝo en la Renkontiĝo mi tranoktis ĉe privata domo de vilaĝano, baniĝis en varma fonto, dancis kun vilaĝanoj k. t. p. Mi povis havi diversajn interesajn spertojn dank' al Esperanto kaj dank' al nepalaj esperantistoj. Mi tre ŝatis Nepalon, do mi jam kvar fojojn partoprenis en la Renkontiĝo. Antaŭ kelkaj tagoj mi hazarde vidis broŝuron "Esperanto en Azio n-ro 86" kaj mi trovis konatajn nomojn de Nepalo. En la 4a Azia Kongreso de Esperanto en Katmanduo, kelkaj el miaj nepalaj konatoj estis gestudentoj kaj geknaboj. Nun tiuj gejunuloj aktivas en la nepala Esperantomovado. Mi esperas, ke iliaj agadoj fruktos. Ĉi-jare mi vizitos Nepalon por partopreni en la 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo ankoraŭ foje. Por mi Nepalo ne estas simpla lando por vojaĝi, sed speciala lando, kie miaj esperantaj geamikoj loĝas. Baldaŭ mi povos revidi ilin. Tio donos al mi grandan plezuron.

~ S-ino Kikuĉi Noriko.

Salutmesaĝo el Vjetnamio

Saluton miaj nepalaj samideanoj,

Mi tre ĝojas, ke Nepala Esperanto Asocio decidis eldoni la revuon Montejo. “Montejo” sendube estas bela kaj multsignifa nomo. La apero de via revuo estas ĝojinda signalo kontribuanta al la evoluiĝo de Esperanto-Movado en Azio. Nome de Informada Komisiono de VEA (Vjetnama Esperanto-Asocio), mi deziras al vi sukceson kaj prosperon. Krome, mi esperas ke en venonta tempo, ni povos efektive kunlabori ne nur en Informado sed ankaŭ en aliaj fakoj.

Amike,

~ *Tran Hoan-Ĝojo*

Mia Unua Komuna Seminario

Je lastaj tagoj de decembro 2014 mi havis la okazon partopreni en la 33-a Komuna Seminario. Komuna Seminario (KS) estas ĉiu jara junulara evento organizita laŭ vice de kvar landoj: Ĉinio, Koreio, Japanio kaj Vjetnamio. Lastjare (2014), la 33a-KS alvenis al Ho Ĉi Minh urbo de Vjetnamio. La 33a-KS estas mia unuafo ĉeesti en tia renkontiĝo. Do, mi frue preparadis por vojaĝo. (Ĉar ĉi Komuna Seminario estis okazigita en Ho Chi Minh urbo- la urbo en la sudaparto de Vjetnamio dum mi loĝas en Hanojo, la nordaparto).

Atinginte la urbon, mi estis impresigite de la varmege kiel en somero. Tamen tiu vetero strange komfortigis min ĉar en mia hejmurbo tiam estis vintre, tre malvarmege.

La ĉeftemo de la 33a-KS estas: “Kunlaboro inter aziaj gejunuloj”. Ĉeestis pli ol 50 personoj de ses landoj: Vjetnamio, Ĉinio, Japanio, Koreio, Indonezio, Hispanio. Kaj speciale usona esperantisto de Havajo ankaŭ subtenis KS-on per sia partopreno. Mi ĝuis la bonŝancon komuniki kun multaj eksterlandaj geamikoj kaj pli sciigi

pri kulturo de aziaj landoj. Estis vere mirinde, ke mi povis gustumi bongustajn rizbiskvitojn de japanaj geesperantistoj aŭ admires tradician dancon de indonezia amikino.

En la dua parto de la 33a-KS, ni kune vojaĝis al Tunelo Ĉi (malproksime de la urbocentro 70 kilometrojn nordokcidente), ĝi estas grava historiejo kun multe da tuneloj en kiuj vjetnamaj soldatoj devis resti dum militoj. Ni ankaŭ gustumis pladon nomita bolita mandioca por ke, ni povu sperti la laboreman kaj mankan vivon de soldatoj pasintece. Kiaj mirindaj kaj senprezaj spertoj!

La 33a Komuna Seminario estis ŝanco por mi kaj multaj Esperantogelernantoj renkontiĝi kun gesamideanoj kaj ĝui en Esperantujo. Mi esperas, ke en la estonteco mi povos partopreni en pli da Esperantokongresoj, renkontiĝoj kaj festivaloj landaj kaj eksterlandaj.

~ Hoang Ngoc Bich



Ekskurso Dum Komuna Seminario



Partoprenantoj de 33-a KS

“NEJO:

Malfermi la Verdajn Fenestrojn al la Pinto de l'mondo”

Nome de Filipina Esperanto-Junularo (FEJ), mi plej elkore salutas kaj gratulas al revuo “Montejo” okaze de ĝia reestablo!

Nepala Esperanto Junulara Organizo (NEJO) estas ĝis nun la plej nova landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kaj ĝian akcepton al TEJO fare de la Komitato mi ankoraŭ sufiĉe bone memoras. Mi kredas, ke kvankam situante en

unu el la plej altaj terenoj de la mondo kaj do “tre proksima al la ĉielo”, NEJO kiel pluraj aliaj organizoj en Azio en si mem alfrontadas aron da problemoj kiuj efektive malfaciligas ĝian efikajn funkciadon kaj agadon. Tiel ankaŭ estas en FEJ. Sed estas vere videble, ke NEJO konstante trovadas solvojn por ĝi, pli kaj pli vaste malfermante ĝiajn fenestrojn al la tutmonda movado.

Bonvolu lasi al mi rakonti iun anekdoton:

En 2006, grupo da montgrimpistoj el Filipinoj kaptis la atenton de la tuta lando pro sia rara peno grimpi la plej altan monton de la mondo, *Everesto*, pri kiu Nepalo certe fieras. La vojaĝo estas dokumentita per videoj, ke oni regule povu vidi la progresojn kaj malfacilaĵojn, kiujn la grimpisto alfrontadis dum la suprenirado. Kiel ajn la situacioj estis tiel danĝeraj kaj malsanigaj por ili, ili kuraĝis supren kaj sukcesis, igante ilin rekorde la unuaj filipinanoj, kiuj atingis la pinton de *Everesto* kaj ricevis la rekonon kaj premiojn, kiujn ili plene meritis.

Do, estas ĝenerala regulo, ke oni, per ajna maniero, aŭ evidenta aŭ eĉ ne, ricevos bonajn reciprokojn, kiujn tiu meritas pro siaj senlacaj klopodoj atingi siajn celojn, nur se tiu ĉiam strebos ke siaj agadoj ne stagnu, sed progresu kaj iru supren kaj antaŭen, kiel ajn la ĉirkaŭaj situacioj malfavoras. Nepalo, kurante rapide supren al la plej altaj rangoj de aziaj landoj koncerne Esperantomovadon, certe tion scias kaj efektivigas -grimpo post grimpo.

Kiel entuziasma uzanto de la modernaj teknologiaĵoj, bonas ĉiam, ke en tiu ĉi teknologia epoko ni ĉiam klopodas bone registri en dokumentojn niajn progresojn, agadojn, kaj planojn, ekzemple de tiu ĉi revuo, por, inter miloj da kialoj- havi ion montrindan al niaj gefiloj, genepoj, kaj tiel plu. El tiuj spertoj estos ja aferoj rememorindaj kaj feliĉigaj, kaj tio, en si mem, estus la plej granda premio, kiun eblos ricevi kiel ĉiam ardaĵ movadanoj!

Jam pli kaj pli da eventoj organizas la nepala Esperanto-movado, kaj tiujn eventojn ĝuis ne nur la civitanoj, sed ankaŭ eksterlandanoj, kiuj estis feliĉaj ne maltrafi la okazojn vidi la pintojn de la mondo- sub la bonveniga, varma, kaj verda etoso. Estas reciproke espereble, ke NEJO sin vidos sur la pinto de sukceso en siaj streboj plivastigi Esperanton en sia lando.

El mia oficejo en la filipina respubliko mi bone sekvos la venontajn eldonojn de tiu ĉi revuo kaj certe kontribuados al ĝi. Jene mi ankaŭ alvokas al aliaj Esperanto-aktivuloj, ene de Nepalo aŭ eksterlande, kontribui al la revuo por pliriĉigi la interŝanĝojn de ideoj kaj spertoj.

Kiel mi jam kvarfoje emfazis en miaj artikoloj en *Libera Folio*, *Kontakto*, kaj eĉ *Esperanto*, mi diras jene: “Azio estas la modernepoka espero de la tutmonda junulara Esperanto-movado” - kaj divenu NEJO estas granda atesto al tiu ideo! Antaŭen kaj supren!

~ Albert S. T. Garrido
Filipina Esperanto-Junularo (FEJ)
Ĝenerala Sekretario,

Mallonga skribo pri Juneco kaj ĝia Estonteco en Nepalo

Nacia Junulara Politiko, 2010 difinas "Junecon" la virinojn, virojn kaj trian generon de 16-40 aĝo grupoj. Nepalo havas 38.8% -n da juna loĝantaro. Feliĉe kaj fiere ĝi estas Juna lando!

La politiko rekonas ke la junulara vikleco estas valoraĵo de la nacio. La juneco estas ne nur esenca fonto de la ŝtato sed ankaŭ ŝanĝo agento. Junuloj estas la pioniroj de ekonomia, socia, politika kaj kultura transformo. La politiko imagas aldoni lojalecon de junuloj al la nacio, nacieco kaj homoj, plenumante la bazajn bezonojn de la junuloj kaj promocii bazajn valorojn kaj normojn kiel ekzemple la principoj de egaleco kaj justeco.

La Nepala politiko emfazas ke la rolo de juneco estas subteni naciajn sendependecon kaj suverenecon de Nepalo, subteni la ekonomian, socian, politikan kaj kulturan transformon kaj certigi la aktivan partoprenon de la junuloj en ĉiu proceso de ŝtato.

Konkludo:

Kuraĝigi, konsoli kaj investi sur junecon provizi bonan edukon kaj ŝancon al junuloj estas ĉefa rimedo por nepalo konstrui la landon.

*~ Biswa Goutam
Prezidanto de NEJO*

Kion vi imagas pri Nepalo?

Vi demandis pri mia imago de Nepalo. Do, kiam mi pensas pri Nepalo, mi pensas pri la Himalajo. Tia altnivela montaro estas vere eksterordinara en la tuta mondo! Mi revis viziti ĝin dum multaj jaroj kaj mi tre ĝojas ke mi baldaŭ povos travivi ĝin. Mi memoras ke Bharat Ghimire - tre elegante kaj interese - prelegis pri sia lando en la esperanto klubo en Malmoe (kiam li partoprenis la mondkongreson en Kopenhago). Li ankaŭ parolis pri viaj diversaj internaciaj renkontiĝoj, kaj mi tuj decidis ke mi iam volos partopreni. Por la vojaĝo mi preparas min per legado pri Nepalo, sed fakte, kaj mi povas diri tion - mi ne scias tiom multe.

~ Helga HOLMGREN

Saluton Nepalo! mi vivas en Italio. En februaro mi venos al Nepalo por la 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo. Vi demandis min skribi kiel mi imagas pri Nepalo, por via gazeto nomata "Montejo". Mi imagas Nepalon kun altaj montoj ĉiam blankaj kun neĝo kaj tre grandaj temploj, kaj belaj. Infanoj kun grandaj nigraj okuloj

~ Angela

Mi loĝas en Italio en malgranda urbo ĉe la maro. En la venonta monato mi partoprenos en la 11-a Himalaja Renkontiĝo kaj mi estas tre scivolema pri Nepalo. Mi neniam estis en Nepalo kaj, kiam mi pensas pri ĝi, mi bildigas du kolorojn: la verdon kaj la blankon. Ne ĉar ili estas la koloroj de la Esperanta flago, sed ĉar ili estas la koloroj de la herbo kaj la neĝo. En miaj pensoj, mi antaŭvidas Nepalon plenan de grandaj herbejoj kun malgrandaj vilaĝoj el lignaj dometoj, mergitaj en vastaj valoj ĉirkaŭitaj de grandegaj montoj.

Kiam mi estis infano, mi imagis fablan urbon aŭskultante tre belan kanzonon titolitan "Kathmandu", de la brita kantisto Cat Stevens (1970), aŭskultu ĝin: https://www.youtube.com/watch?v=8420UW2_veM

Mi estas tre kontenta havi la eblecon viziti Nepalon per Esperanta renkontiĝo, ĉar estas ŝanco koni la landon kaj samtempe komuniki kun ĝia loĝantaro.

~ Alex Mazzetti

Pri mia imago de Nepalo antaŭ la venonta vizito, mi povas diri nur sekvontajn vortojn Mi ĉiam ligas/asocias Nepalon kun altaj montaroj, multnombra etnioj kun diversaj lingvoj de bonanima homoj, malnovaj historiaĵoj precipe de religia deveno, belega naturo, danĝeraj altmontara vojoj. Mi esperas vidi pli multe de tiuj dum HR.

~ Ivan Slivov

Mia imago pri Nepalo ne estas tute malklara, mi fakte venos unuan fojon al Neplo, tamen mi jam vojaĝis en Himalajoj de norda Hindio (Ladakh) kaj de miaj gepatroj mi aŭdis nur pozitivaj rakontoj pri ilia vojaĝo en Nepalo. Mi atendas precipe ĝentilaj, ridantaj homoj, ĉar tiel mi ekkonis personoj vivantaj en tiu ĉi parto de la mondo. Interesaj renkontoj kun lokalaj kaj eksteraj esperantistoj, bonan, pikantan manĝaĵon kaj interesan naturon. Mi ĝojas baldaŭ renkonti nepalajn esperantistojn

~ Dawid Pochanke

Nepalo – Mia Tria Patrolando

Dum mia infanaĝo mi havis ion nebulan impreson, ke Napalo estas tre bela lando, kaj kiam mi legis iun libron pri la unua grimpadado de Everesto, mi pli interesiĝis pri ĉi tiu fora lando.

Mia patrino estis norvego kaj pro tio mi vizitis norvegon relative ofte. Norvegio havas, kiel Nepalon, altajn kaj tre belajn montojn kaj mi ŝategis fari longajn promenojn tie kune kun miaj amikoj aŭ en organizitaj grupoj somere.

Dum iu vizito de unu de miaj amikoj en Kopenhago, li montris al mi broŝuron pri Himalaja Renkontiĝo, kaj mi tuj sciis ke mi nun havas la ŝancon viziti foran landon kaj partopreni en Esperanto kunveno, malgraŭ mi estis komencanto pri paroli Esperanton. La lando estis tre bela, la popoloj estis gastigemaj kaj bonkoraj kaj mi havis ege bonan restadon en Nepalo. Duon jaron poste okazis UK en Kopenhago, kaj mi invitis kelkajn nepalajn amikojn loĝi ĉe mi dum tiu okazaĵo en Danio, kaj mi havis agrablan monaton gastigante nepalajn amikojn. Ni kune vizitis kelkajn vidindaĵojn-mi lernis kuiri rizon kaj ĉiu tage ili helpis min zorgi mian ĝardenon. Jes, ni kune havis agrablan monaton.

Poste, mi plibonigis mian esperanton, kaj du fojojn mi revizitis Nepal. Mi sentas feliĉon kiam mi vizitas miajn amikojn en iliaj hejmoj, saluti iliajn familiojn, kaj mi sentis min tre bonvenigitaj per varma etoso. Estis interese por mi esplori kaj sperti tute alia kulturo, kiu estis tre malsama kompare kun nia kulturo en Danio kaj eĉ en Eŭropo.

Mi fakte pri kelkaj personaj demandoj havas pli proksimajn relatojn al nepalanoj ol al miaj samlandanoj. Kiel vegetarano Nepalo estas paradizo, preskaŭ ĉiuj manĝaĵoj estas sen viandoj, kaj mi kompreneble ĝuas tion. Kiel budhanoj kaj hinduoj mi kredas al la teorio pri revivo, eble en alia formo, sed profunde la saman ideon.

Ĉi jare mi ankaŭ partoprenos en Himalaja Renkontiĝo, kaj kun ĝojo atendas la promenon en la montoj kaj la amikeca etoso.

Mi estas dano, mia patrino norvego kaj tiu lando estas mia dua patrolando. Iam mi pensis ke Nepalo estas mia tria patrolando, do vere ekzistas kelkajn bonajn relatojn. Mi esperas ke mi povos reveni plurajn fojojn al Nepalo.

~ Peter wraee

Revinda Renkontiĝo

Jes, multaj junuloj revas aventurojn; kelkaj eble efektiviĝos, aliaj estas nur revoj. Mi proksimiĝis al adoleska aĝo kiam iu novzelandano, helpata de loka portisto venkis la plej altan montpinton de la Tero. Certe mi legis la libron de la famiĝinta Edmund Hillary kaj admiris la sindonemon de Tenzing Norghe. Mi apenaŭ ekkonis en tiuj jaroj la montaron kaj, iom post iom, konsciis ke alfronti ĝin estas nesupraĵa entrepreno. Sed, dum jardekoj, ofte grimpante en niaj Karpatoj kaj eĉ pro neatendita ŝanco konante ankaŭ la Alpojn, fortiĝis en mi la konvinko ke la rekompenco de la montaro superas la malfacilaĵojn.

Tia estis mia rilato al la montaro kiam, dum iu UK, la reprezentanto de Nepalo, fine de la saluto al la Kongreso, aldonis haste: ni invitas vin al la freŝdate organizita (aŭ organizota) Himalaja Renkontiĝo „! Mi memoras ke mi ricevis tiun informon kun melankolio: :”Jes, bravuloj, vi povas inviti nin, sed kiu povus vojaĝi ĝis via lando?” Temis precipe pri la distanco, pri la kostoj, pri la antaŭ viditaj malfacilaĵoj. Temis ankaŭ pri la fakto ke en mia vivo de tiu periodo, pezis pli aliaj prioritatoj.

Pasis la jaroj!. pli ol dekok verŝajne. De tempo al tempo, aperis en la esperantaĵoj, raportoj pri daŭre organizitaj tiaj renkontiĝoj. Sojle de mia 67 jariĝo, mi decidis akcepti tiun defion, kaj mi

festis mian naskiĝdatrevenon surteriĝante en Kathmanduo. Unua ĝojo inter amaso de atendantaj homoj, rekoni konatan belan vizaĝon, tiu de Indu Devi Thapaliya. Mi estis rimarkinta ŝin dum pluraj UK-oj, sen vere konataĝi kun ŝi ne okazis.

Ek de la unuaj momentoj de la akcepto, enbusiĝo, refreŝiĝo, dank al la atenta Peter, -la dano, - konatiĝo kun la japana grupo, alvenanta samtempe, mi komprenis ke vere indis trairi aviadile milojn da kilometroj. Certe, mi informiĝis iomete antaŭe pri la lando, ĉar amikoj kaj iamaj studentinoj miaj jam vizitis Nepalon. Sed la senpera travivado superis la atendojn. La ĉefurbo konkeris min per historiaj monumentoj, per siaj koloroj kaj la svarmantaro homa. Sed, ĝis iu punkto, turismo estas nur turismo. Mia kontentiĝo estis kompletigita per la etoso. Mia kunĉambranino, - Miĉiko-partoprenis 20 jaroj antaŭe, la tute unuan Renkontiĝon. Mi enviis ŝin pro la bonhumuro kaj saĝeco, kiu povas aŭ ne, esti ligita al la aĝo.

Sed la grupo iĝis vera teamo nur post la forlaso de la konforto. Ni vojaĝis kelkcentojn da kilometroj por atingi vespere, tarde provincan esperantan grupon, kiu atendis nin ne nur por vespermanĝi kune sed, precipe, por interŝanĝi esperantajn veraĵojn, por revivigli la lokan agadon. Se mi bone memoras, B.G. nia nelacigebla fotisto kiu donacis nin per identigiloj la unua tago, devenis el tiu urbeto. La kontento ke ni povis esti utilaj al tiu grupo viŝis parton de la laciĝo kaj ni eltenis ĝis la unua horo matene, kiam ni atingis Itahari.

Tamen, krom kronologiajn detalojn, mi ŝatus rememori animstatojn kiujn, je mia granda ĝojo, mi travivis dum nia renkontiĝo. La unua estis feliĉa momento, dum kiu ni povis admiri plenstelan ĉielon, vere brilajn stelojn, kiujn ni ne plu povas vidi en niaj

urboj. Tie, forlasante la unuan esperanto-grupeton, tarde en la nokto, ni havis tiun ŝancon. Verŝajne helpis ankaŭ nia alproksimiĝo al la alta montaro: la ĉielo kaj la steloj estis pli proksimaj. Ekde nun, la naturo de Himalajo ,iom post iom malkovriĝos al ni. Samgrade, niaj fizikaj kapabloj alfronti la altaĵojn mezureblis tago post tago.

Admirinda nia adaptiĝo al la kondiĉoj ! Certe, la partoprenantoj estis ĉiuj montaramantoj kaj ne, nur! Multaj el ni bone prepariĝis elteni la fizikajn malfacilaĵojn! Sed ne ĉiuj! Tamen, la unua nokto je 2000 metroj (en Chauki) estis neatendita sperto! Kaj frue matene, la unua rekompenco! Oni povis diveni, nord-okcidenten, la majestan Chomolungma-n! La sekvantaj tagoj, nia infaneca fiereco daŭre kreskis, ĉar ni marŝis sur altaj vojoj, ni atente notis la altitudon de pasejoj kiujn ni lasis malantaŭen, avide aŭskultis Bharat, la organizanto kiu rakontis al ni la legendojn de la Sankta Lago, kaj fiere ni ricevis la anoncon ke ni alfrontos la” plej profundan valon de la mondo”, ĉar la najbaraj krestoj estis pli ol 3000 metrojn altaj. Sed li ne avertis nin ke ni devos malgrimpi ĝin de Jorpokhari ĝis la fundo!.Do, ni adiaŭis la jak-karavanojn, la vilaĝetojn disŝutitajn sur nia alta vojo kaj pretiĝis ĝui la vegetaĵojn kiuj abundis ĉe ĉiu vojkurbiĝo. Mariŝa, la polino, malkovris belegajn ruĝajn florojn, falantajn el giganta arbo, sinjoro Hori Jasuo provokis nin je paciencelprovo; foti mirinde kolorigita, sed terure moviĝantan papilion. Finfine ni alvenis en la vilaĝo de „bluaj tegmentoj”. Mi klarigas : kiam Bharat sorĉis nin parolante pri la mirinda valo, evitis informi nin ke estus bone atingi ian lernejon tagmeze, ĉar 300 lernantoj tie atendas nin. Pro malfacileco de la malgrimrado (certe mi diras nenion novan al vi asertante ke malsupreniri krutan valon estas centfoje pli malfacila ol la grimrado). Ni multe malfruiĝis, kaj, kiam pro malpacienco

ni demandis al niaj nepalaj akompanantoj, ĝis kien ni devas iri, ili senescepte respondis :”ĝis la vilaĝo de bluaj tegmentoj”. Estas senutile diri al vi ke kvazaŭ ĉiuj domoj en la valo havis „bluajn tegmentojn”!Tamen, la kuraĝigo funkciis! En la korto de la lernejo, oni akceptis nin per floroj. Kortuŝis nin la infanaj kaj adoleskaj vizaĝoj de tiuj kiuj pacience atendis nin kelkajn horojn. Ni hontis pro la malfruiĝo! La lernantoj vestis belajn uniformajn vestaĵojn, diversaj laŭ la gradoj de la lernejo. Oni diris al ni ke la lando sukcesas lernigi pli ol 95% de la infanoj. La posta tago niproterpasos alian lernejon kaj ni konscios kiom krutajn deklivojn la infanoj devas alfronti ĉiutage por veni al la lernejo.

Ni restis en la vilaĝo de Sangu ĝis la venonta tago. Ni havis tempon ordigi niajn impresojn. Pro tio ke ofte la vojeto pasis tra la kortoj aŭ tre proksime de la domoj, ni konstatis ke, laŭ la situo en la valo, kelkaj kamparanoj apenaŭ komencis pretigi la kampon ; pli malalte, oni jam plugis la teron; poste oni vidis la kamparanojn semi aŭ planti. Kiam, post kelkaj tagoj ni alvenis al la alta ebenaĵo, oni vidis jam kreskantajn plantojn. Alia konstato; la homoj transportas kvazaŭ ĉion sur la ŝultroj: de la nutraĵo ĝis la konstrumaterialoj ; mirigite ni vidis junulon kiu supreniris la valon portante volumajn ladojn por la famaj bluaj tegmentoj. Aliflanke, ni jam miris ekde la komenco kiom pezajn ŝarĝojn surpronis niajn junajn portistojn! Sed, alia detalo kiu agrable impresis nin estis la amo de la loĝantoj por la vivaj koloroj, ilia estetika sento :ĉiuj terasoj havis bele skulptitajn barilojn, floroj pendis ĉie!

Niaj unuaj kvar tagoj de kontakto al la montaro finis en fama komerca vojkruciĝo. Nia mirinda valo gvidis al konfluenco de pluraj torentoj super kiun, duonfiere, duontimeme, ni pasis per

moviĝanta ŝnurponto. Pro tio ke nia grupo ne marŝis en simila ritmo, en tiu haltejo ni devis atendi ke ni regroupiĝu. Oni havis tempon por manĝi, por foti kaj rimarki neatenditajn detalojn: inter ripozantaj muloj, inter sakoj da diversaj nutraĵoj, vestaĵoj, ujoj, videblis vendejon de poŝtelefonoj. !La venontajn montoj kaj valojn ni trairis buse. Estis konsilinde rigardi nur supren, admiri la altaĵojn. Se hazarde la okuloj turniĝis malalten, kelkfoje oni povis surprize konstati ke la radoj centimetre evitis truegon kondukantan al abismo. La mallumo bonŝance kaŝis novan timigan aspekton de la vojo.

Sojle de la nokto ni alvenis al Tapleĝung. Tie ni dormis en hoteleto kie oni ankaŭ ebligis al ni ĝui varman akvon. Matene, ni grimpis en diversaj veturiloj, kovritaj aŭ ne kaj komencis la proksimiĝo al la plej alta punkto de nia itinero. Mallonga halto en Suketar, poste, daŭrigo sur vojo en konstruo ankoraŭ kelkajn kilometrojn. Ni apenaŭ sukcesis admiri la florantajn arbojn, ĉar la polvo leviĝanta el la vojo kaŝis ĉion. Mi memoras ke Miĉiko preferis trairi piede tiun distancon. Post ripozo sub malavara suno, ni alfrontis piede krutan deklivon, tiuj admirindaj padoj konstruitaj el plataj ŝtonblokoj sed metitaj vertikale en la tero, tiamaniere ke sub niaj ŝuplandoj troviĝis la plej tranĉa parto de la bloko. Sed mi komprenis ke nur tiu tipo de konstruo ebligas la reziston al la neĝo, pluvo, glitado k. t. p.

Jam de kelkaj tagoj oni parolis pri la templo de Pathibhara, fina celo nia Himalaja aventuro. En la lasta rifuĝejo ni devis dormi tre mallonge. Dum la gaja konversacio ĉirkaŭ la fajro, vespere, la organizantoj konsilis al ni komenci la grimpadon je la tria matene, sen senvualigi la kialon de tiu konsilo. Je la tria akurate, la japanoj kaj la eŭropanoj, ni estis pretaj. Nek unu nepalano

videblis. Hori Jasuo, senvorte vokis la tutan grupon kiel ĉefo, donis la signalon kaj ni ekstartis. Survoje, je 3500 metroj de altitudo, Pierre rezignis kaj mi tuj decidis akompani lin. Maldirekte al la pinto. Du aŭ tri geĵapanoj imitis nin. Sed tiuj kiuj sukcesis daŭrigi, komprenis ke indus ekstarti tre frue: je la sesa horo, la sunleviĝo kovris de rozkoloro la pintojn, kaj la panoramo, de Kanchenĝanga al Sagarmatha (Everesto) estis mirinda, neforgesebla pejzaĝo! Niaj nepalaj amikoj, certe pli al kutimiĝitaj al la grimpadado - aliaj fortoj, aliaj koroj, aliaj pulmoj komencis grimpi je la 5-horo kaj tuj atingis la templon. Mi konkludis ke ni, eŭropanoj, ni tro serioze prenis la tempindikojn. Nia edukado postulas respekti la programon por respekti la aliajn. Mi sentis min malkapabla grimpi kaj reveni en la indikita tempo. Mi hontus altrudi al aliaj atendi min. Ni tamen atendis poste la grupeton de nepalinoj, kiuj marŝis je ilia ritmo.

Revenante al Tapleyung, belega fotita panoramo ornamis la muron de la hotelo. La feliĉuloj kiuj ĝuis la montaron sub la rozaj radioj de la frua suno, konfesis al ni - la frustritaj - ke ĝuste tiun vidindaĵon ili admiris ĉe la pintoj. Nova akcepto de la lokanoj, adiaŭaj paroladoj kaj donaco de silkaj fulardoj markis la momenton kiam ni vere forlasis la altan montaron. Nova enbusiĝo, vojoj abruptaj, malsupreniradoj ĝis funde de valoj, denove suprenveturadoj Michel, kiu havis altimetron, fiksita surbrake samkiel horologiĝo, anoncis de tempo al tempo : Nun ni estas ĉe 2000 metroj, nun ni troviĝas ĉe 600 metroj, kaj denove supren, post pasado de torentoj. Ni tagmanĝis en iu urbeto, ni vizitis kelkajn teksaĵvendejojn, kaj, laŭ la longa vico de atendantoj kun malplenaj diversaj ujoj, ĉe la putoj, ni komprenis ke manko de akvo estis grava problemo tie.

La posta nokto ni dormis en Ilam. Bharat sugestis al ni ke ni trairu jam vespere la te-plantejon ĝis iu pitoreska kiosko. Frumatene, samtempe de la sunleviĝo ni iris denove tien por trinki teon. Oni klarigis al ni la kialon de la tranĉado de la te-arbedoj, kaj ni komprenis, laŭ la amarecaj vortoj de Bharat, ke la laboro kaj la produkto de nepalanoj en la regiono de Ilam alportas profiton al la najbaraj hindoj kaj al la angla komerco, ĉar la folioj de teo de Ilam, vendiĝas sub la nomo de Teo de Darĝelingo. Survoje, ni haltis ĉe loka vendisto de teo netransformita industrie.

Kaj fine, ni atingis la ebenan ŝoseon en Birtamode. Ĝi trairas la landon de Oriento al Okcidento, sur kvazaŭ 1200 kilometroj (aŭ eĉ pli). Ni estis akceptita en la hejmo de iu loka esperantisto kie ni gustumis kaj trinkis, konante ankaŭ lian familion. Posttagmeze, ni haltis ĉe la patrino de Bharat. Kaj tie ni ekkonis ankaŭ lian avinon, kiu, supozeble devus esti mia kuraĝiga modelo : je la aĝo de 92 jaroj ŝi kapablis grimpi ĝis la pinto kiun mi abandonis. La lasta kunmanĝado kune kun niaj amikoj nepalaj, kiuj akompanis nin dum la semajno en la montaro, okazis surborde de riverego (kvazaŭ seka antaŭ la musosno) kaj ni ridis, trinkis, dancis ĝis sunsubiro. Kelkaj revenis kun ni al Itahari, de kie ili estis kaj kie komencis nian marŝadon. La oraganizantoj de tiuj renkontiĝoj konstatis jam de tiom da jaroj ke la kungrimpado, la longa kunvivado realigas veran aktivan esperantan kurson. La tuta grupo, farita de 10 japanoj, 8 eŭropanoj kaj 12-15 nepaloj parolis dum 8-9 tagoj nur esperante. Mi memoras la laŭdindan obstinecon de Hori Jasuo korekti la prononcadon de Santos, kiu deklaris, ekde la unua matenmanĝo en Itahari :”mi estos via lernanto dum la venontaj tagoj”. Mi certas ke la nivelo de esperanto iom kreskis kaj ke la partoprenantoj de la kultura tago en Itahari kapablis kompreni la prelegojn kiujn ni prezentis antaŭ la asambleo.

Nia revenvojaĝo al Kathmandu okazis senproblemoj. Ia bedaŭro sentebliis en la aero. La disiĝo al proksimiĝis. La du paroj de francoj decidis halti en grava vojkruciĝo por iri al Pokhara. Mi enviis ilin pro la ŝanco havi kiel ĉiĉerono la admirinda Krishna Kanta, kiu zorgis eksterordinare por ni dum la tuta itinero. Kion diri? Ke mi esperas iam havi lin kiel ĉiĉerono – ie – en Nepalo?

La ĉefurbo rekonkeris nin. Mi vizitis kelkajn librovendejojn, kelkajn admirindajn placojn. La antaŭlasta tago ni vizitis en hospitalo la du japanojn kiuj estis malsanaj, ni tagmanĝis ĉe Parashar kaj vespere ni kuniĝis en la ejo de la Esperanto klubo en Thamel. Bonŝance, mia flugo okazis post unu tago, do, en la hejmo de Indu, ni povis ankoraŭ babilo kaj fari projektojn por novaj renkontiĝoj, ĉu en Nepalo, ĉu en Eŭropo, kial ne ,en Rumanio?

Krom la nedifinebla plezuro spiri aeron super la nuboj, grimpi en la plej altaj montaroj de la mondo, la 10-a Himalaja Renkontiĝo riĉigis min per homaj rilatoj. Kia ĝojo ekkoni admirindan personon kiel Noriko, kies atentemo por la aliaj estis kortuŝa! Kia kontento, trovi en multaj esperantaĵoj, antaŭaj kaj postaj al tiu 2013, la artikolojn de aŭ pri Hori Jasuo, kies famecon mi ne konis antaŭe! Mi rekonis lin en esperantaj filmoj, en listoj de partoprenantoj al UK-oj kiujn ankaŭ mi partoprenis. La diskutoj kun li estis riĉigaj kaj mi estas dankema al li por tiom da interesaj raportoj kaj mesaĝoj.

Mi ĝojas ke la postulo de Bharat, skribi por la planita gazeto "Montejo" ebligis al mi tiom da elvokoj, tiom agrablajn memoraĵojn, Dankon!

~ Maria Butan

Sud-Azia Unuiĝo por Regiona Kunlaborado

Sud-Azia Unuiĝo por Regiona Kunlaborado angle **South Asian Association for Regional Cooperation (SAARC)** estis fondita antaŭ tri dek jaroj. 18-a kunveno de SAARC okazis en Kathmandu en 2014 Decembro. Ili promesis multe. Ili volas kreski kiel Eŭropa Unio, tamen faris multe de bruo sed iras kaj laboras malrapide kiel testudo kaj termito. SAARC festis ĝian 30 jariĝon estas en decembro 2014. Sed la homoj demandas " kion ili faras? ". SAARC ankaŭ volas uzi komunn monon kiel EU sed ĉu Pakistano kaj Barato konsentiĝos? Ĉu ĝi eblus? Kiam ili forte laboros? Ĝi estas fora revo !

~ Navin Shrestha

Ho! Kio Okazas?

Malgranda pasero flugante trovis manĝaĵojn en la planko. Post iom da tempo pasero aŭdis laŭtan bruon. Homoj komencis kuri. Bovoĵ, bubaloĵ, kaproj komencis plori. Ho ve! terure kio okazas? Vidante tion la malgranda pasero surprigiĝis kaj sidis en la teraso. Teraso estis forte svingita tie. Malgranda pasero for flugis kaj sidis en la arbo.

En tiu sama arbo kie sidis pasero ankaŭ estas aliaj birdoj sed tiu arbo ankaŭ estas forte svingita do birdoj flugis kaj iris foren. La laŭta bruo ankoraŭ ne estis multa. Hundoj estis plorantaj. Hodiaŭ kio okaĝas? malgranda pasero ne sciis.

Samtempe Polvo flugiĝis tra la aero tial la malgranda pasero ne vidis vojon. Li sidis en la drato de elektro. La drato estis svingita do li denove flugis kaj sidis en la tegmento de la domo. La tegmento de domo ankaŭ estis svingita. Oh! kio okazas hodiaŭ? La malgranda pasero vere surprigiĝis. Li volis demandi sed neniu estis ĉirkaŭ li. Liaj gepatroj ne estis kune kun li ĉar ili iris por serĉi manĝaĵojn.

Kial ĉio estas svingita? La homoj estis bruantaj en nekompreneblaj lingvoj. Li vidis ke la planko fendigis. Post iom da tempo altaj domoj komencis disfali. La malgranda pasero pensis ke mia nesto ankaŭ disfaliĝos. Li ne povis iri serĉi lian neston ĉar la polvoj ankoraŭ ne haltigis kaj malebligis vidi la vojon. La malgranda pasero denove flugis kaj sidis en la pordo de vendejo proksime de la domo kie li antaŭe estis. Tie la malgranda pasero aŭdis la voĉon el radio. En la radio novaĵoj komenciĝis. Novaĵoj eldiris ke antaŭ kelkaj minutoj en la valo estis ses rektor-skala tertremo. En tiu tertremo multaj domoj disfalis kaj multaj homoj mortis. Kaj la malgranda pasero komprenis ke antaŭe okazis tertremo. Radio ankaŭ parolis ke homoj ne konstruis siajn domojn fortege tial iliaj domoj disfalis kaj devis alfronti tiun ĉi katastrofon.

Tertremo jam haltigis. Post iom da minutoj la bruo ankaŭ mutiĝis. La malgranda pasero memoris kion la radio diris. Homoj devas konstrui fortajn domojn por ke la malgranda tertremo povas fari nenion. Ne nur tio, se tertremo okazus ni ne devus kuri tien kaj ĉien. Sed ni devas kuri en la sekuran lokon.

Post iom da tempo fajrobrigado kaj ambulanco venis kaj savis vunditajn homojn. La malgranda pasero kromprenis multajn aferojn vidante diversajn teruraĵon.

La malgranda pasero flugis al lia nesto, feliĉe ĝi estis sekura. Li pensis ke mia nesto estas tre forta ol la domoj de homoj. La malgranda pasero atendis liajn gepatrojn en lia nesto.

~ Abhilasha Pokhara

Unu Korna Rinocero Unikaĵo de la Mondo

Nepalo estas malgranda sed bela lando. Ĝi okupas 0.03%-n de la spaco el la tuta mondo. Ĝia tuta areo estas 1,47,181 kvadrata

kilometro. En Nepalo troviĝas multaj bestoj, birdoj, montoj, riveroj k.t.p. En nepalo troviĝas rinocero kun unu korno sed en aliaj landoj ne povas trovi ĝin kaj ni nepalanoj fieras ke ĝi estas unikaĵo de nia lando.

Unu korna rinocero estas kiel du korna rinocero. Sed la diferenco estas korno. Laŭ la kalkulita statistiko pri rinocero, vivantaj unu kornaj rinoceroj estas proksimume 2,400 en Neplo. Oni povas trovi unu kornan rinoceron en Ĉitavan nacia Parko, Bardia nacia parko. Unu korna rinocero ŝatas vivi en aluvia inundita ebenaĵo, ĉirkaŭ humida rivero. La pezo de unu korna rinocero estas proksime 2,000 kilogramo. Ili vivas 40-50 jarojn kaj la alteco estas proksimume 1.75-2 metroj.

La plej granda unu-korna rinocero povas naĝi kaj manĝi subakve. Dum varma sezono ili ŝatas subakvigi korpon kaj dum la malvarma sezono ili ŝatas ĝui sunon.

Se vi vere volas vidi unu kornan rinoceron bv nepre viziti Nepalon. La taŭgaj monatoj por vidi unu kornan rinoceron estas de Septembro ĝis Februaro.

~ Abhishek Pokhrel

Denove Estu Muso

Estis unu sanktulo en la vilaĝo. Unu tagon kiam li estis promenanta en lia vilaĝo li vidis museton kuŝantan ĉe la vojo, ŝajnis al li la museto ege aminda. Tial li tuj decidis kunporti museton en lia domo. Ĉiu tage li nutris la museton kaj tre baldaŭ museto iĝis Muso. Restante kun sanktulo, muso sciis ke sanktulo povas fari ĉion kion li volas, Muso ĉiam timis kun kato. Tial muso petis al la sanktulo " Sanktulo, mi timas katon Bonvolu ŝanĝi min al kato"

Sanktulo levis lian dekstran manon benante ke muso iĝu kato muso ŝanĝiĝis al kato. Kato komencis promeni ĉirkaŭ la vilaĝo kiel superulo. Sed tamen hundo bojis lin. Kato rapide kuris kaj grimpis arbon. Poste, kato revenis hejmen kaj petis sanktulon! Sanktulo hundo bojas min bonvolu fari min hundon. Mi volas esti hundo sanktulo faris same kiel li antaŭe faris kaj kato iĝis hundo.

Kato ŝanĝis al hundo. Sed lia deziro esti superulo ankoraŭ ne plenumis hundo komencis pensi se mi estus trigro, mi estus ĉefbesto. Tial hundo repetis al sanktulo "Sanktulo, mi volas esti tigro". Bonvolu fari min tigran." Sanktulo denove levis dekstran manon kaj diris "estu tigro. "

Kiam hundo iĝis tigro tiam li komencis suferi kaj ataki sanktulon. Do, pro la sufero sanktulo denove levis lian dekstran manon kaj diris "denove estu muso". Tuj tigro ŝanĝiĝis al muso, kaj muso kuris ĉirkaŭ sanktulo plorante sed muso ne-kuraĝis repeti sanktulon.

~ Shree Prasad Pokharel

Renkontiĝa Informilo

11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo de Nepalo, 26a de februaro ĝis 8a de marto 2015

Nepala Esperanto Asocio kore bonvenigas ĉiujn partoprenantojn de la 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo. Ni dankas vin por via intereso pri nia malgranda lando plena je grandaj montoj, kaj esperas ke vi ĝuos vian restadon ĉe ni.

Laŭ la fiksita programo, vi unue havos ŝancon rigardi valon Kathmanduo kaj alkiĉiĝi malrapide al nia vivmaniero. Poste vojaĝante al pokhara belajn montĉenojn bonvenigos vin tie. De pokhara ni piedvojaĝos al Ghandruk, Tadapani, Ghorepani kaj

Pun Hill. Fine ni revenos al Pokhara kaj de Pokhara al Kathmanduo kaj ni havos Internacian vesperon en Kathmanduo. Ni rigardas la renkontiĝon sanco provi utilecon de Esperanto kiel ligilo inter popoloj kaj esperas ke vi kontentiĝos pri la rezulto. Se vi trovos ian nekontentigaĵon bonvolu tuj atentigi s-ron Pradip Ghimire (Esploristo) pri tio. Dankon!

~ La 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝa Teamo

Konigi la mondon al Nepalo, kaj Nepalon al la mondo per Esperanto

Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la 11-an Internacian Himalajan Renkontiĝon 2015 por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj. Apenaŭ ekzistas iu lando en la mondo kiu povus rangi samnivele kun Nepalo rilate al natura, etna kaj kultura diverseco. Partoprenante la Renkontiĝon, vi havos ŝancon formi vian propran bildon de la lando kaj samtempe konatiĝi kun lokaj kaj alilokaj esperantistoj kiuj partoprenos la samajn programerojn. Ni bonvenigas ankaŭ homojn kiuj volas komenci lerni Esperanton dum la Renkontiĝo.

La programo estas planita por ke ĝi taŭgu al ĉiuj aĝgrupoj. Dum via restado, vi loĝos en bonkvalita hotelo en Katmanduo kaj en komfortaj gastejoj aŭ tendoj dum la piedvojaĝo. Ĉiuj manĝokostoj kaj aliaj similaj kostoj estas inkluzivitaj en la aliĝokosto, sed ne asekuro. La kotizo estas kalkulita nur por kovri kostojn, ne por gajni monon. Similaj turismaj servoj kutime kostas pli multe. Multaj niaj servoj estas faritaj de nepalaj esperantistoj.

Vi pasigos la unuajn kaj lastajn tagojn de la Renkontiĝo en la valo de Katmanduo, kie situas la ĉefurbo de Nepalo. Ĝian riĉan kulturen pasintecon atestas la tieaj historiaj distriktoj kaj

monumentoj, notinde tiuj de la plej grandaj urboj, Katmanduo, Bhaktapuro kaj Patano. Tie vi povos vidi kiel hinduoj kaj budhanoj restas fidelaj al siaj jarcentaj tradicioj malgraŭ multflanka modernigo de la valo. Ĉi-foje vi povos ekkoni la kulturon kaj vivmanieron de homoj en la okcidenta parto de Nepalo. La ĉefa parto de la Renkontigo estos busvojaĝo al Pokhara kaj piedvojaĝo en la regiono je preskaŭ 300 kilometroj nordokcidente de la valo de Katmanduo. Dum la marŝado vi trapasos multajn lokojn plenajn de vidindaĵoj, inkluzive Pokhara, Uleri, Ghodepani, Tadapani, Ghandruk kaj ree Pokhara. Ĉe la horizonto estos mondfamaj montirceloj de Nepalo, kreantaj majestajn vidojn de Himalajo.

La piedvojo inter Ghandruk kaj Ghodepani estas plejparte tra nelogata rododendro-arbaro. La tereno tie estas kovrita de arbaro kaj punktita de diversaj sovaĝaj floroj, inter kiuj estas malsamaj specioj de rododendro, la nacia floro de Nepalo. Vi ankaŭ ĝuos vidojn de nigraj simioj, cervoj, moskuloj ktp kaj diversaj specioj (pli ol 250) de montaraj birdoj. Ekde la komenco vi povos observi la vivon kaj kulturon de etnaj popoloj: la Gurungoj kaj Magaroj. Tiuj ĉi etnoj, oni opinias ke devenis de Mongolio kaj Tibeto, kaj ili estas konataj kiel senafektaj kaj honestaj. Plejparte ili estas tradicie terkultivistoj kaj bredistoj. Ili havas distingajn lingvojn, domstilon, vestojn, ornamojn kaj kutimojn, kaj estas aparte famaj pro siaj ravaj dancoj kaj muziko. La plimulto da ili vivas sur altaj deklivoj sude aŭ okcidente de riveroj. La vivo de tiuj montpopoloj estas modesta, ĉar laboro sur la deklivoj estas penega. Plejparte ili sekvas la budhism religion.

Pun Hill estas unu el la popularaj piedvagadaj cellokoj de la masivo de Annapurna. Ĝi estas facile atingebla, sed piedvagantoj

devas marŝi plejparte aŭ supren aŭ malsupren. La programo sekvos la ĉefan vojon. Vi trairos pitoreskajn kampojn de rizo, abundajn arbarojn de rododendro kaj belajn vilaĝojn plejparte loĝatajn de Gurungoj kaj Magaroj. Pintoj de Annapurna, ekzemple Annapurna Sudo (7.219 m), Annapurna II (7.937 m), Annapurna III (7.555 m), Annapurna IV (7.525 m) kaj la Fiŝovosto (Machhapuchhare) (6.997 m) iĝos videblaj ekde la tago de la marŝado de Ghorepani ĝis Pun Hill.

Tiuj majestaj montoj aperas malsamaj ĉiutage. De Ghorepani kaj Pun Hill, vi povos ĝui vidojn de du montaroj samtempe: Annapurna kaj Dhaŭlagiri. Unuhora vagado de Ghorepani al Pun Hill frue matene premios vin per impona sunleviĝo sur pli ol 10 pintoj de Annapurna kaj Dhaŭlagiri. Kiam la suno tuŝos la neĝajn pintojn de la du gigantojn Dhaŭlagiri (8.167 m) kaj Annapurna (8.091 m), kaj amaso da aliaj pintoj, malrapide komencos aperi, kiel per magio, antaŭ viaj okuloj nekredebla vidindaĵaro.

Laŭtaga Programo

26-a de februaro: Alveno kaj enhoteliĝo

27-a de februaro: Matena vizito al Paŝupati Nath kaj Sojambhu Nath

28-a de februaro: Veturo al Pokhara kaj tranoktado en Birethati.

1-a de marto: Piedvojaĝo al Ghandruk.

2-a de marto: Piedvojaĝo al Tadapani

3-a de marto: Piedvojaĝo al Ghorepani (2.860 m).

4-a de marto: Frumatena marŝado al Pun Hill (3.290 m) por sunleviĝo sur Annapurna kaj Dhaŭlagiri. Post la matenmanĝo, piedvojaĝo al Tikhedunga.

5-a de marto: Piedvojaĝo al Nayapul. Reveturo al Pokhara

6-a de marto: Ripozo kaj adiaŭa vespero en Pokhara

7-a marto: Reveno al Katmanduo per buso

8-a de marto: Ripoztago kaj Internacia Vespero

9-a de marto: Forflugo

Nepala Esperanto-Asocio

Esperanto estis bonvenigita al Nepalo antaŭ 50 jaroj. Pioniroj de tiama Esperanto Movado estis Tiobor Sekelj kaj Siom Milojeviĉ kiuj ambaŭ instruis en Kathmanduo dum pluraj monatoj. La novaj esperantistoj fondis la unuan esperantan organizon kaj nomis ĝin Kathmandu Esperanto Scieto. Tiu organizo sukcesis inspiri la idealismon de Esperanto Movado al siaj membroj tra la Kathmanduo valo. Bedaŭrinde la movadaj agadoj ĉesis kiam la plej aktivaj membroj disiĝis al aliaj lokoj pro profesiaj kialoj.

La Nepala Esperanto asocio estis fondita la 3an de novembro 1990 kaj estis formale registrita la 12an de decembro 1991. La unua kongreso okazis en 1991.

Tiam s-roj Masahiro Mark Ono kaj Philip Pierce kontribuis multe al la Movado. Philip daŭre helpas ĝin. La organo montejo estis eldonita ekde 1992 de NEspA.

En 1990 s-ro Pradip kumar paudel iĝis unua prezidanto de NEspA. En 1991 s-ro Mukunda Raj Pathik estis la unua elektita prezidanto, kaj poste anakŭ f-ino Maja Rai, s-ro L. P Agnihotri kaj D-ro Keshab Ram Joshi faris bonajn laborojn kiel prezidantoj de NEspA.

Nuntempa estrarano kaj konsilanto de Nepala Esperanto Asocio:

Prezidanto :Indu Devi Thapalija

Vic prezidantoj : Shree pokheral, Him lal Paraĝuli

Ĝenerala sekretario : Bharat Kumar Ghimire

Sekretario : Prakash Ghimire

Kasisto : Sakuntala Dhakal

Membroj : Navin Lal Shrestha

: Deepak Shrestha

: Binita Rimal

: Ramesh Arjal

: Bharat Parajuli

Kosilantoj : Parasar Rijal

: Philip Pierce

: D-ro Mukunda Pathik

: L. P Agnihotri

Renkontiĝo-ĉefo : L. P Agnihotri

Nepala Esperanto Junulara Organizo (NEJO)

En Nepalo E-movado prosperis rapide kaj sentante la prosperon de movado junularoj fondis NEJO-n. kiel junulara sekcio de NEspA kaj en la jara 2013 ĝi sukcesis iĝi landa sekcio de TEJO. La fondinta Prezidanto de NEJO estis s-ro Dhurba Pokharel la unua kongreso de NEJO okazis en 26an de junio 2004.

Nuntempa Estrarano de NEJO

Prezidanto : Biswa Raj Goutam

Vic prezidanto : Sudhir Ghimire

Ĝenerala Sekretario : Navaraj Buda

Sekretario : Pradip Bhandari

Kasisto : Deepa Dahal

Membroj : Pradip Ghimire

: Rajkumar Lamsal

Internacia Himalaja Renkontiĝo (IHR)

En la suda parto de Azio inter Hinda unio kaj ĉinio situas regiono kun la mondfama monto everesto, multaj antikvaj temploj kaj aliaj belegaj vidindaĵoj. Tiu lando estas Nepalo. Por konigi Nepalon al alilandaj esperantistoj, la Nepala Esperanto-Asocio organizas IHR-n. Kiel unua Mark Ono el Japanio proponis al la asocio ke ĝi okazigu IHR-n. IHR estas plej granda evento en la kalendaro de la E-movado en Nepalo kaj nutempe populara en monda esperantujo. Pro sia kutime bela vetero februaro kaj marto estis elektitaj por la renkontiĝo, kiam la montaro videblas bonege kaj la antikvaj temploj de Kathmanduo brilas. Temperaturo varias inter ĉirkaŭ 4⁰c (nokte) kaj 21-24⁰c (tage).

Utilaj Informoj

Al la partoprenantoj de 11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo Nepalo (26a de februaro ĝis 8a de marto)

Vetero kaj Klimato: Nepalo havas kavar sezonojn: Vintro: Decembo ĝis februaro, Printempo: marto kaj aprilo, somero: junio kaj aŭgusto, aŭtuno: septembro kaj novembro.

Kathmanduo: Ĝi havas plej bonan temperaturon. Averaĝe 19-35 celcius somere kaj 2-12c vintre. Alisezone temperaturo restas milda ĉirkaŭ 15-25 c.

Pokhara: Pokhara estas pli vama ol Kathmanduo.

Lingvo: La nepala estas oficiala, tamen la lokanoj parolas lokajn lingvojn.

Loka tempo: UTC+5horoj kaj 45 minutoj.

Mono: La oficiala valuto estas rupio (rs). Ekzistas moneroj 1, 2, 5, 10 kaj la monbiletoj 1, 2, 5, 15, 20, 50, 100, 500, 1000. Monŝanĝado eblas en flughaveno, Hotelo kaj Banko.

Telefonado: Al nepalo + 977 kaj de Nepalo 1424 + landa kodo + telefonnumero

Gravaj telefonnumeroj: por polico:100, por ambulanco:102

Interreto: En multaj hoteloj, restoracioj, kafejoj troveblas senpagajn interretojn (Vifio)

Medikamentoj: Receptoj estas angle skribitaj en urboj troviĝas diversaj apotekoj kaj kelkaj el ili funkcias 24 horojn.

Trinkakvo: Trinku akvon nur en precizaj lokoj ekzemple (Hotelo, Kafejo) oŭ trinku aĉetante.

Manĝado: Organizanto zorgas pri manĝado dum via programperiodo.

Loĝado: Hotelo Marsayngdi en kathmanduo

Kelkaj farendaĵoj kaj nefarendaĵoj en Nepalo

La formo de saluto en Nepalo estas Namaste! Oni faras ĝin kunigante ambaŭ manplatojn antaŭ la brusto kaj dirante Namaste!

Antaŭ ol eniri domojn, templojn, stupaojn, ne forgesu demeti la ŝuojn. Preskaŭ ĉiu ledaĵo estas malpermesita en temploj.

Neniam tuŝu aliajn homojn per piedo. Tio estas rigardata kiel ofendo.

Petu permeson antaŭ ol eniri hinduan templon.

Kiam iu skuas la kapon dekstren-maldekstren, tio signifas ”jes”

Listo de la aliĝintoj (enlandaj kaj eksterlandaj)

No	Nomo	Lando	Retadreso
1.	Hori Jasuo	Japanio	hori-zonto@water.sannet.ne.jp
2.	Kikuĉi Noriko	Japanio	
3.	Kon Kumiko	Japanio	
4.	Toyamo Yoko	Japanio	
5.	Yosii Tomii	Japanio	
6.	Peter Waree	Danio	peter@wraae.dk
7.	Maria Bhutan	Romanio	butan_osiek@yahoo.com
8.	Helga Holmgren	Svedio	helgaholmgren@hotmail.com
9.	Paŭl Peeraerts	Belgio	paul2711@gmail.com
10.	Aleandro Humet	Belgio	
11.	Helena Peeters	Belgio	
12.	Dawid Pochanke	Sovislando	dapo71@gmx.net
13.	Bert De Wit	Nederlando	ajf.dewit@ziggo.nl
14.	Ivan vlev Slivov	Bulgario	slivov@capital.bg
15.	Manlajo	Tajvano	youmanlai@gmail.com
16.	Arnaldo Rebelato	Brazilo	a.rebelato@yahoo.com.br
17.	Luiz Fernando	Brazilo	
18.	Leonardo Avaloni	Brazilo	
19.	Anita Mendonaca	Brazilo	
20.	Angela Maria Martins	Brazilo	
21.	Rachel A. A Cota	Brazilo	
22.	Virginia GR Guimaraes	Brazilo	
23.	Viviane GM Barreto	Brazilo	
24.	Lucia Beraldo	Brazilo	
25.	Rosiada T. de Moraes	Brazilo	
26.	Danilo Avaloni	Aŭstralio	
27.	Mariana Avaloni	Aŭstralio	
28.	Maria Lizabete Pinheiro	Aŭstralio	
29.	Alex Mazzetti	Italio	alex@nodobandiera.it
30.	Camarda Angela	Italio	

31.	Indu Devi Thapaliya	Nepalo	luno1962@gmail.com
32.	Shree Prasad Pokhrel	Nepalo	shree_pokharel@yahoo.com
33..	Him Lal Parajuli	Nepalo	himal66666@yahoo.com
34.	Bharat Kumar Ghimire	Nepalo	nespa_bharat@hotmail.com
35.	Prakash Ghimire	Nepalo	
36.	Sakuntala Dhakal	Nepalo	shakuntala.dhakal@yahoo.com
37.	Nabin Lal Shrestha	Nepalo	skribu.navin@gmail.com
38.	Bharat Kumar Upadaya	Nepalo	bharatupadhyay24@gmail.com
39.	Binita Rimal	Nepalo	rimalbinita@yahoo.com
40.	Deepak Shrestha	Nepalo	dipakshrestha10322@yahoo.com
41.	Ramesh Kumar Aryal	Nepalo	
42.	Mukunda Raj Pathik	Nepalo	mpathik@gmail.com
43.	L.P. Agnihotry	Nepalo	subasgautam@hotmail.com
44.	Parasar Rijal	Nepalo	pr.rijal@yahoo.com
45.	Mukunda Chhetri	Nepalo	muknda_chhetri@yahoo.com
46.	Harka Shrestha	Nepalo	
47.	Krishna Kanta Neupane	Nepalo	
48.	Janardan Upreti	Nepalo	
49.	Chol Nath Pokhrel	Nepalo	cholnath@yahoo.com
50.	Pradip Ghimire	Nepalo	esploristo@hotmail.com
51.	Bishow Raj Gautam	Nepalo	bishwa.gautam@gmail.com
52.	Navaraj Budha	Nepalo	navaraj_esp@yahoo.com
53.	Alinka Pokhrel	Nepalo	
54.	Pradip Bhandari	Nepalo	
55.	Depa Dahal	Nepalo	
56.	Nabin Subedi	Nepalo	subedinabin@hotmail.com
57.	Philip H. Pierce	Usono	nrc@wlink.com.np
58.	Mian Salam Shany	Pakistano	m.s.shany@gmail.com
59.	Lila B. Baniya	Nepalo	
60.	Maya Rai	Nepalo	
61.	Babuam Neupane	Nepalo	
62.	Sita Ghimire	Nepalo	
63.	Bini Shrestha	Nepalo	

64.	Madav Ghimire	Nepalo	
65.	Jeevan Ghimire	Nepalo	
66.	Nilam Bimali	Nepalo	
67.	Punya Prasad Acharya	Nepalo	
68.	Shreejana Joshi	Nepalo	
69.	Jesoda Chapagai	Nepalo	
70.	Sudhir Ghimire	Nepalo	
71.			
72.			
73.			
74.			
75.			

Sugestoj kaj viaj komentoj:
